Novjorka Prismo

Numero 155 **Junio 2006**

Esperanto Society of New York

VENU AL NIA SOMERA PIKNIKO!

Come to our Summer Picnic!

When: **Saturday, June 17, 2006**, 11 A.M. Rain or shine.
See page 2 for directions and information about other summer meetings.

Where: **Winter Garden**, World Financial Center, New York (see page 2).

Bring: Lunch for yourself or to share, songs to sing, musical instruments to play, Esperanto poems, jokes, or short stories to read aloud, games, etc.

Children, family, and friends are all welcome!

Protokolo de la kunveno de la 19-a de majo 2006

Nia prezidanto Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la 7-a horo kaj duono. Sekvis kelkaj anoncoj. Tomaso ECCARDT diris, ke Silvia ROTTENBERG kaj ŝia edzo Carlos URIA venos el Argentino al Novjorko en frua parto de junio, kaj ke ili bezonos loĝejon ĉi tie.

Alex KHARKOVSKY parolis pri koncerto de Mikaelo BRONŜTEJN por ĉirkaŭ 200 ruslingvaj maljunuloj ĉe Bayonne Daycare en Nov-Ĵerzejo. La kantoj estis en la rusa kaj jida lingvoj sed Mikaelo menciis Esperanton dum la koncerto.

La protokolo de la aprila kunveno estis akceptata.

La grupo poste diskutis la someran piknikon. Ni decidis okazigi ĝin en la Winter Garden ĉe World Financial Center, la 17-an de junio je la 11-a horo atm.

Ni parolis pri ebla renkontiĝo en la Bronksa Zoologia Parko (Bronx Zoo) en aŭgusto aŭ septembro.

La kandidatiga komitato, kiu serĉos kandidatojn por la venontjara estraro estis elektita. La komitatanoj estas Jeff BLAKESLEE (ĉefo), Tomaso ECCARDT, kaj Wendy BELL.

Anstataŭ prelegon, Tomaso prezentis detalojn pri la planado por la venonta ELNA-kongreso en Novjorko. Li respondis al demandoj de la grupo pri la aranĝoj. Ni komencis decidi kiuj el ni helpos pri la diversaj aspektoj de la kongreso.

Je la 9-a horo, Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

Novaj geesperantistoj

La 28-an de majo Marta Bergonzoli kaj Rolando Marks ricevis diplomon pro fini elementan Esperanto-kurson. Gratulon licenciiĝintoj! ★

– Tomaso ECCARDT

IBM Plaza

La 4-an de junio 11 geesperantistoj kunvenis neformale ĉe IBM Plaza kaj diskutis la venontan ELNA kongreson inter aliaj aferoj. Mia studanto Rolando ĉestis Esperanto-kunvenon la unuan fojon. ★ *–T.E.*

Pri Novjorko por ne-novjorkanoj . . .

Ĉu vi spertas pri interesa aspekto de Novjorko kaj deziras verki artikolon pri tio? Eble ni bezonas vian verkon por la gvidlibreto de la ELNA kongreso en julio! Ni jam havas ĝeneralan enkondukon, kaj artikolojn pri transporto, restoracioj, biertrinkejoj, muzeoj, pri periodaĵoj, librovendejoj kaj bibliotekoj. Do se vi povas verki artikolon pri ALIA temo, bonvolu sendi ĝin al Jim Medrano ĉe la adresoj en la lasta paĝo de *Prismo*. ★

– Tomaso ECCARDT

Marta, Maki, Nijl, kaj Tom ĉe FIT.

Ĉu via lasta *Prismo*?

Estas la politiko de ESNY sendi sian novaĵ-leteron nur al homoj kaj grupoj, kiuj resendas la verdan slipon (aliĝilon). Tio helpos nin direkti *Prismon* al la homoj, kiuj plej ĝuas ĝin. Do en septembro, se vi ankoraŭ ne resendis la slipon, anstataŭ ekzemplero de *Prismo*, vi ricevos leteron, kiu klarigos kiel vi povas renovigi vian abonon. ★

ESNY SUMMER CALENDAR 2006

The following Esperanto get-togethers will take place this summer.
For more information, directions, etc. contact Stuart Green, or one of the other officers listed below.

June 17 **Saturday 11:00 AM**	**Winter Garden Picnic.** Our annual summer get-together. Rain or shine. To get there, take any subway to Fulton Street, Corlandt Street, or WTC and walk west. Use the Liberty Street bridge to the World Financial Center and walk north (right) to the Winter Garden; or cross West Street at Vesey Street and walk south (left) to the Winter Garden. Meet inside the glass-covered Winter Garden, at tables nearest to the river. If the weather is nice, we'll venture outside to the plaza next to the beautiful yacht boatyard.
July 2 **Sunday 1:00 PM**	**IBM Plaza Atrium.** Indoor babilado in preparation for the ELNA kongreso in the Big Apple.
July 21, Friday – **July 24, Monday**	**ELNA Kongreso** (until July 24, plus other excursions with our out-of-town samideanoj). Register online at: https://esperantousa.hypermart.net/aligxilo-en.html
August 5 **Saturday 10:00 AM** **(not Sunday)**	**Free ferry ride to Governor's Island!** Long off-limits, this plum military assignment is now open to the public pending a decision on what to do with it. We'll meet in ticket waiting line at Battery Maritime Building, 10 South Street at Whitehall Street, next door to Staten Island Ferry Terminal, 2 blocks east of Battery Park. If crowds make tickets unobtainable, we'll picnic in the park. Note Saturday date and morning time!
August 16 **Wednesday 6:30 PM** **(not Friday)**	**"Goodfellas"** (rated R) free film at Riverflicks on Pier 54 (not #25), Fourteenth Street at the Hudson River. Take the #1, 9, 2, 3, A, C, or E train to Fourteenth Street and walk west. Movie takes place at end of long pier. If you can't find where we are sitting, wait near the projector, until one of us notices you. The movie will begin at dark (~8:00-8:30 PM) Seating and free popcorn available. No rain date – note Wednesday date.
September 3 **Sunday 12:00 PM**	**Bronx Zoo.** Admission $12, $9 seniors and children. Meet at the Asia entrance (Gate A). By subway: take either the #2 or #5 train uptown to East Tremont Ave/West Farm Square. Exit to the left, through the turnstile. At street level, walk straight ahead (follow train uptown) on Boston Road 2 1/2 blocks to the Bronx Zoo gate. Note earlier hour (noon).
September 15 **Friday 6:30 PM**	**United Federation of Teachers,** 50 Broadway. Next regular ESNY meeting. Come hear about the summer's Esperanto conferences and tell us about your summer! ★

E-eventoj in Bayonne

Vendrede, la 5-an de majo, Misha Bronshtejn (Tihvin, Ruslando) vizitis Bayonne, NJ. Mi kaj Mila, mia amikino, montris al Misha Jersey City kaj Bayonne. (Milochka ŝoforis sian aŭton, mi ĉiĉeronis). Ni montris al li Bayonne Medical Daycare, kiun ni vizitadas kelkfoje semajne.

Misha koncertis, akomponante sin per gitaro. Li kantis Esperante, Ruse, Jide, kaj Ukraine, kaj deklamis proprajn poemojn. Por mi estas surprizo, ke li estas matura Rusa poeto – lian poezion en Esperanto, precipe kantojn mi bone konas.

Oni demandis lin pri vivo en Rusujo, pri Esperanto, ktp. Kelkaj homoj ekvolis lerni nian karlingvon.

La 8-an de majo, mi prelegis pri Esperanto antaŭ la sama grupo. (Ambaŭfoje pli ol 100 personoj). Post la leciono mi disdonis 20 kopiojn de la ruslingva E-lernolibro de Akademiano Boris Kolker, esperante, ke la semoj donos fruktojn. ★

– Aleksandr HARJKOVSKIJ

Silvia kaj Carlos

Mi ĉeestis ekspozicion de la artisto Carlos Uría kaj renkontis lin kaj lian edzinon Silvia Rottenberg tie. Silvia estas eksprezidantino de la argentina landa asocio – ŝi kaj Carlos jam vizitis nian klubon plurfoje kaj eble ĉeestos nian piknikon. ★

– Tomaso ECCARDT

Tradukado de mia rus-lingva libro pri Eroshenko

Sabaton, la 6-an de majo, ni, Alex Harjkovskij kaj Arnold Victor, renkontiĝis en kafejo por priparoli eventualan angligon de mia libro *Homo, kiu vidis la mondon*. Angligon faros Arnold, profesia tradukisto, mi aŭtorigos la tekston kaj trovos eldonejon. Antaŭe dum la aprila kluba kunveno mi donacis japanan eldonon de la libro al Maki Sano, kiu promesis post tralego donaci ĝin al sia patro dum U.K. en Italio. ★

– Aleksandr HARJKOVSKIJ.

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto	**Koresponda Sekretariino**	**Protokolisto**
Stuart Green	Rochelle F. Grossman	Jeff Blakeslee
(631) 751-5683	(718) 457-1490	(718) 383-2715
Vicprezidanto	**Kasistino**	**Program-Direktoro**
Nijl Blonstein	Sofiya Soskina	Thomas Eccardt
(212) 410-3950	(914) 813-2495	(212) 477-6516

Novjorka Prismo
Numero 155 – Junio 2006
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

Redaktoro	**Subredaktoroj**	**Desegnistino**
Jim Medrano	Thomas Eccardt	Mary Pulley
(212) 982-5029	Nancee Medrano	

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-pośto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York